



Estrara Komunikado EKO 2015-13 sendita en la 21a de aprilo. Sendita sen PDF-versio sed kun alkröcita foto tuj antaŭ ekflugo al la estrarkunsido de Roterdamo. PDF postfarita kun tiu foto.

Strategia forumo inter niaj Aziaj Asocioj

La prezidanto de UEA pasigas semajnon en Ĉinio antaŭ ol pluiri al Roterdamo por la estrarkunsido, kaj tie partoprenis multajn kunsidojn. Inter ili estis labora forumo kun reprezentantoj de pluraj aziaj Landaj Asocioj. Raporto ne venis ankoraŭ, ĉar la prezidanto kune kun la estrarano Lee Jungkee sidas nun en aviadiloj eŭropencelaj. Sed tri fotoj flugis pli rapide ol ili. Mi alkröcis unu el ili (nun senpere videbla), kaj aperigos aliajn poste, se eble el Roterdamo kune kun plena raporto. Evidente, ni komunikos de tie ankaŭ rezultojn de la estrarkunsido.



Prezidanto Mark Fettes kaj estrarano Lee Jungkee planas estonton kun reprezentantoj el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Mongolio, kun reprezentantoj de ILEI kaj IKEF en unutaga forumo.

Enketilo tiras limigitan reagemon

Ĝis nun revenis iom malmultaj respondoj al la enketilo por Landaj Asocioj. En alvenordo, jen la resendintaj landoj: Venezuelo, Bulgario, Taĝikio, Albanio, Nederlando, Kanado, Svislando, Britio kaj

Svedio. Japanio promesis liveri ĝis la limdato (la 30a de aprilo). Seso da pliaj landoj iel reagis (ĉefe por peti la enketilon en alia formato ol PDF). Tiu respond-proporcio (8 el 71, t.e. ĉ. 11%) estas profunde mizera, se konsideri, ke post du jaroj de simila enketado en ILEI, la respond-proporcio atingis 80%. Krome, ni sendis la enketilon ne nur al la 71 aliĝintaj asocioj, sed ankaŭ al nealiĝintaj kaj al iuj, kiuj agas en nur parto de rekonata ŝtato – al ĉ. cent asocioj entute.

Se via Landa Asocio ja resendis respondojn, aŭ firme promesis fari tion, kaj vi ne aperas en la listo, bv. protesti vigle (prefere kun la sendodato), kaj mi esploros tion.

Ĉe la Fakaj Asocioj, similas la reago. Respondis, laŭ alvenordo, Bahai (BEL), skoltroj (SEL) F.V. Lorenz – spiritismo (SEA), Unu Mondo (UM), Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), Ŭonbudhismo (EAŬ), ekoloĝoj (AVE), Medicinistoj (UMEA), Filatelo (ELF-AREK), Etnismo (IKEL). Do, respondis 10 FA el 38, kompare al 8 LA el ĉ. cent. Oni devas konkludi (surprize) ke la Fakaj Asocioj estas iom signife malpli endormiĝintaj ol la Landaj Asocioj.

Simila mesaĝo por Fakaj Asocioj, se vi sendis respondon, sed ne aperas en la listo, protestegu! Gratulon al la respondintoj, kaj malgratulon al la aliaj! Nepre provu reagi ĝis la 30a de aprilo!

9a Mezorianta Kunsido

Tio okazos en spektakla regiono de Turkio en la urbo Ŭrgŭp en datoj anoncotaj. Por informoj, petu de Renato Corsetti aliĝon al la listo: 9-a-mezorienta-kunveno@yahoo.com

Oni RISKAS jam du jarojn

La 13an de aprilo 2013 estis lanĉita nia ludo RISKŬ. Ĵus pasis la dua datreveno. Dum tiu periodo aliĝis al la ludo 684 personoj el 65 landoj kaj ludas ĉiumonate regule ĉ. 130 riskemuloj. Detalojn pri la ludo bonvolu vidi en la paĝo de statistiko.

<http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=risko>

Apartajn gratulojn al la plej diligentaj ludantoj, inter kiuj Nicole Els el Aŭstralio mistrafis eĉ ne unu tagon: nicolee (AU) 731, bujdoso (HU) 730, vmel (RU) 728, Barbulo (HU) 723, euxgeno (BY) 709, Vojacek (CZ) 705, viktoro44 (AD) 701, viktoro44 (PL) 701, vente (RU) 687, arankal (RS) 672. Okaze de la datreveno ni invitas vin ludi hodiaŭ almenaŭ unufoje por saluti nin.
<http://www.edukado.net/ludoj/risko>

Plia trejnseminario

Inter la 08a kaj la 12a de aprilo okazis en Budapeŝto internacia trejna seminario pri novaj komputilaj kaj interretaj rimedoj, uzeblaj / uzindaj de Esperanto-instruistoj.

Inter la temoj estis manaĝado-sistemo por interretaj kursoj; aŭtomatigo de priservado de klientoj kaj tele-kursoj; reklamado en Facebook kaj AdWords; komunikado inter individuoj kaj grupoj - kanaloj kaj metodoj; grupa laboro per nubaj metodoj; signo-rekonaj programoj por Esperantaj dokumentoj; senpagaj programoj el la nuboj, sen instalado.

La seminarion gvidis Szilvási László, gvidanto de Lingvo-Studio ĉe Eventoj en Budapeŝto. Ĝi okazis enkadre de EU-financita kunlabora projekto por Interkultura Centro Herzberg (DE) kaj Centro pri Interkultura Edukado en Nowy Sancerz (PL) - kun la ĉeftemo: strategioj por internacia kunlaboro en la kampo de plenkreskula edukado.

Altnivelaj staĝoj en Bouresse, Francio

Pluraj dum aprilo jam okazis, pro la neapero de EKO 9 tro malfruas raportoj. Por sciigi pri la ebloj, vidu la retejon de Kvinpetalo <http://www.kvinpetalo.org/>

De la 14a ĝis la 18a de majo okazos denove staĝo por lerni ĉiĉeronadon, sub gvido de Anne Ambler, profesiulino pri turismo, homaj rilatoj kaj trejnado. Ĝi celas la gvidontojn-ĉiĉeronojn, iliajn

helpontojn, kaj la tradukontojn, por la turisma programo de la Universala Kongreso en Lillo en 2015. La akiritaj kompetentoj utilos ie ajn, interalie por prepariĝi al la faka branĉo "Turismo kun Interpretado" de la Atesto pri Kapableco de FEI.

UEA kaj Vivlonga lernado

Esperantistoj bone agadas ĉe projektoj pri tutviva edukado kaj programoj de la Tria Aĝo. Okazos tiutema konferenco de Parizo en la 8a de septembro, 2015, kaj UEA partoprenos tion: ĝi aperas en la presita partoprenlisto de Asocioj. La prepara raporto petebblas en la angla kaj franca.

UMEA-Shinoda-Premio aljuĝita al d-ro Disheng Wang, Ĉinio

Tiu premio estis fondita de d-ro Hideo Shinoda (1901-1985) en 1973 por "subteni la sciencajn medicinajn esplorojn, presaĵojn, publikaĵojn, prelegojn de apartaj personoj aŭ de kolektivoj de scienculoj aŭ sciencaj institucioj, kiuj subtenas je iu ajn maniero la aplikon respektive la enkondukon de Esperanto en la medicinan sciencan aŭ praktikan sanprotektajn iniciatojn k.s." (citaĵo el la statutoj de la fonduso). Post dekkvarjara paŭzo UMEA decidis denove aljuĝi la premion.

La ricevanto de la UMEA-Shinoda-premio 2014 estas la ĉina kuracisto d-ro Disheng Wang (王迪生).

Li ricevas la premion pro la elstara artikolo „La opinio de Tradicia Ĉina Medicino (TĈM) pri la kuracado de Ebolo-febro“, publikigita en *Medicina Internacia Revuo* N-ro 2 (103), p. 94-96.

Somera Kurso En TURKU, FINNLANDO 4-7 junio 2015

Dum multaj jaroj ni en Finnlando kutimas havi someran Esperanto-kurson ne nur por Finnoj sed ankaŭ kursanoj el aliaj landoj.

La ĉi-somera kurso okazos en Turku, kiu estas la plej malnova urbo kaj antaŭa ĉefurbo de Finnlando. La kurso estas aranĝita de EAF, Esperanto-Asocio de Finnlando, kunlabore kun Esperanto-societo en Turku kaj ELFI, Finnlanda sekcio de ILEI. La kunlabora instituto en Turku estas Civitana Instituto de Aurala, finne *Auralan kansalaisopisto*, kiu donas la kursejon je nia dispono kaj reklamas pri la kurso.



La instruisto estos Patrik Austin, sperta instruisto de la internacia lingvo, kiu instruis i.a. en kursoj en la universitato de Helsinko kaj dum someraj kursoj de EAF en Valamo. Pliajn informojn pri la kurso kaj aliaj praktikaĵoj donas la sekretario de EAF: Tiina Oittinen, tel. +358-50-5494709, eafsekretario@esperanto.fi. Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 TURKU. Pliaj informoj ankaŭ sur retpaĝoj www.esperanto.fi

Vortoj: 1020

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

PDF-versio kun la alkroĉita foto pri Azio farita SMG, 23 sept 2015. PDF farita de Nuance Power PDF.